

Oficiale agnoskita Esperanta edukcentro en Bulgario

La bulgaria sekcio de Akademia Internacia de la Sciencoj (AIS) atingis sukceson pri agnosko de Esperanto kiel oficiala studadlingvo. Tra pli ol 8 jaroj okazis streboj por ŝtata agnosko en Bulgario de AIS-agado kaj agnosko de Esperanto kiel plenrajta fremda studadlingvo kune kun la angla, germana, rusa kaj franca. Bedaŭrinde en Bulgario (same kiel en aliaj landoj) AIS-diplomoj ne estas ŝtate agnoskeblaj. Malgraŭ, ke en Bulgario jam de 2001 AIS- Bulgario estas registrita kiel memstara scienc-eduka Asocio surbaze de la bulgara leĝo pri jura registriĝo de organizaĵoj kun senprofita celo, AIS-diplomoj ne estas agnoskeblaj de la Eduka Ministerio, same Esperanto ne estas ŝtate agnoskita kiel oficiala fremda studadlingvo en la lernejoj kaj universitatoj.

La oficialuloj tra la jaroj rekomendis, ke kiel oficiala unua studadlingvo ĉe ni estu la angla kaj kiel dua estu Esperanto! Kompreneble ni ne konsentis kun tia propono.

La sukcesoj de la organizitaj de ni Simpozioj “Apliko de Esperanto en la profesia agado” kun partopreno de eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj profesoroj (inter kiuj ankaŭ neesperantistoj), la partopreno de oficialaj reprezentantoj de la Bulgara Akademio de la Sciencoj, la Scienc-Teknika Asocio (STA) en Bulgario, subtemo de la oficialuloj en nia Regiono, BEA-Kongresaj decidoj, kontribuis por la sukceso en la unua etapo de ŝtate agnoskita scienc-eduka AIS- agado.

Surbaze de la ordono № 1/2011j de la Agentejo por profesia edukado ĉe la Ministra Konsilantaro en Respubliko Bulgario, ni ricevis licencon kiel memstara “Internacia Esperanta Centro por profesia edukado” kies oficiala studadlingvo estas ESPERANTO. La angla, rusa, germana kaj franca estos kiel libervolaj duaj studadlingvoj post Esperanto, kiu estas deviga por ĉiuj. Ni jam havas rajton post la fino de la studado doni al la studentoj krom la AIS-diplomojn ankaŭ state agnoskitajn en Bulgario kaj EU dokumentojn pri kelkaj profesiaj fakoj, kiel ekzemple turismiko, administado, librotendado, komputilado k.a.

La atingita sukceso inspiris nin daŭrigi la batalon ĝis la plena agnosko de nia universitata studado, kies baza studadlingvo estas Esperanto. Por ricevi plenan agnoskon kiel memstara Universitato estas bezonote plenumi surbaze de la bulgara eduka leĝo ankoraŭ diversajn postulojn, kiel ekzemple minimuma nombro de dungita personaro, nombro de dungitaj profesoroj, kiuj rajtas prelegi nur en unu Universitato, agnosko de AIS- diplomoj flanke de la Eduka Ministerio en San Marino k.a. postuloj. . Tio nun estas mia prioritata celo kiel prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio.

Pretigita de ILEI surbaze de komuniko de prof. Bojidar Leonov

SMG, 31 majo, 2011